# Familia ESPERANTO

cirkulaĵo n-ro 49 - majo 2011

*Baldaŭa ferio estas tempo por distriĝi. Miĥail Povorin esperantigis*

## LUDOJN EN ESPERANTO




Se tiu divenado jam tedas vin, serĉu aliajn ludojn ĉe
http://mpovorin.narod.ru/ludoj/ludoj.html
(Atentu, ke via krozilo ne rajpos pro malbona skripto !)

# Enhavo


| | |
|---|---|
| Ludoj sur komputilo en Esperanto | 1 |
| Anonco por Kopenhagen irontoj | 2 |
| Jarŝanĝaj eventoj | 3 |
| Nur renkontiĝoj en Francujo kaj Germanujo ?(Armenujo, Ukrainujo) | 6 |
| Aŭtora registro de 2002 ĝis 2007 | 7 |


Familia Esperanto estas OFICIALA ORGANO DE RONDO FAMILIA DE UEA (antaŭe CIRKULAĴO POR ESPERANTLINGVAJ PAROJ KAJ FAMILIOJ)



Mi estas la nova redaktanto de Familia Esperanto.
La numero de ĉi-tiu eldonaĵo, 58, ne signifas, ke jam eldoniĝis 57 numeroj. Bulteno kia ĉi-tiu sufiĉe rapide ĉesas, se ne estas kontribuantoj aŭ redaktantoj estas maldiligentaj.
La ĝisnunaj diligentaj redaktantoj estis Katarina Bodnárová (kvin numeroj en 2002 kaj 2003) kaj Claude Rouget (tri numeroj en 2007). Dankon al ili.
Mi trafoliumis ilin kaj trovis ilin sufiĉe interesaj. Mi eĉ kunmetis 'aŭtoran registron' je la fino de ĉi-tiu numero. Ĉiuj ok numeroj estas elŝuteblaj de http://uea.org/rondo_familia/index.html.

Mi ne scias kiom da legantoj havos 'mia' Familia Esperanto, sed mi aspiras al sama kvanto kiel en 2003: 385 abonantoj en 52 landoj. En 2003 tiuj legantoj estis dividitaj jene:

**Rangoskalo de landoj laŭ nombro de abonantoj en 2003**

| lando | abonantoj | loĝantaro | denseco |
|---|---|---|---|
| Germanujo | 55 | 80 milionoj | 0,69 |
| Francujo | 45 | 57 milionoj | 0,79 |
| Hungarujo | 25 | 10 milionoj | 2,50 |
| Rusujo | 21 | 148 milionoj | 0,14 |
| Belgujo | 19 | 10 milionoj | 1,90 |
| Pollando | 19 | 38 milionoj | 0,50 |
| Nederlando | 17 | 15 milionoj | 1,13 |
| Brazilo | 15 | 159 milionoj | 0,09 |
| Usono | 14 | 258 milionoj | 0,05 |
| aliaj landoj | 155 | | |

Dissciigu pri la nova aperado. La venonta numero atingos vin en septembro. Limdato por kontribuoj al venonta numero estas 1 sep. 2011.
Kaj tiam oni ankoraŭ pagis por la 'cirkulaĵo'. Ĉi-tiun numeron vi ricevas senpage, ĉar pro mia komenca sperto mi ne jam povas liveri al vi la kvaliton, kiun mi alstrebas.
Mi petas vin: Instigu familianojn raporti, komenti, anonci, opinii al via redaktanto Johan Derks.

## Anonco por Kopenhagen irontoj

Dum la venonta UK okazos kunsido kiun vi nepre ĉeestu: prezento kaj historio de la Internacia Infana Kongreseto. Tie vi havos la okazon aŭskulti gvidantojn de pasintaj IIK, historion pri la renkonto mem kaj tutcerte kun ĉeesto de la geinfanoj de aktuala IIK.
Sabate la 23an de julio de la 16a ĝis la 17a30 horo, en Bella Center, venu al la prezento de IIK kaj rakontu/kundividu viajn spertojn pri infanaj renkontoj.
En 1954 okazis la 41a UK en Kopenhago, kaj samtempe la 1a IIK.
En 2011 okazos la 96a UK en Kopenhago, kaj samtempe la 42a IIK.
De la 41a UK al la 42a IIK, ni esperas je via partopreno por tio energi-plena kunveno.
Bonvenas kaj gepatroj kaj geinfanoj.
La membroj de Rondo Familia ĝojas kundividi pri tiu evento kaj atendas vin multnombre.
Por kontribui al tiu programo, bonvolu antaŭsendi mesaĝon al Adenjo.
Intervenoj daŭros maksimume 15 minutojn kaj estu laŭeble plej ludemaj kaj viglaj. La organiza teamo tre aprezos ricevi viajn malnovajn fotojn (prefere en elektronika formo), kaj antaŭĝojas aŭskulti viajn anekdotojn.
Ĝi estas programo por vi, por viaj geinfanoj kaj geamikoj, farita de vi, gepatroj, geinfanoj kaj la aliaj.
Vidu aktualajn informojn ĉe: https://www.facebook.com/event.php?eid=197761123601210
Amike, la organiza teamo (Adenjo, Johan, Claude N., Claude R., Bert, Amri)

# *Jarŝanĝaj eventoj*

*(laŭ Gregoria kalendaro)*

En la februara numero de la revuo 'Esperanto' ĉiujare oni povas legi raportojn de kelkaj jarŝanĝaj eventoj. Malgraŭ tio, serve al legantoj kiuj ne abonas tiun revuon[1], mi volas doni ĉi-tie resumojn de tiuj eventoj.

| | |
|---|---|
| Junulara E-Semajno en Burg, Germanujo: | 27 dec. – 2 jan. |
| Internacia Festivalo (HDP) en Nördlingen, Germanujo: | 27 dec. – 3 jan. |
| Novjara Renkontiĝo[2] (EsperantoLand) en Saarbrücken, Germanujo: | 27 dec. – 3 jan. |
| SANO (Interkultura Centro Herzberg) en Sieber, Germanujo: | 28 dec. – 2 jan. |
| Jarfina Renkontiĝo de Grezijono, Francujo: | 30 dec. – 2 jan. |

**Junulara E-Semajno en Burg, Germanujo**




**Statuo de Neptuno antaŭ urbodomo**

La Junulara Esperanto-Semajno, organizata de Germana kaj Pola Esperanto-Junularoj kune, okazis ĉi-vintre duafoje kunigante pli ol 250 partoprenantojn en la brandenburgia urbeto Burg. Karavanoj venis de interalie Francujo, Nederlando kaj Ukrainujo.

Ĉiu povis elekti la plej taŭgajn programerojn por si mem: lingvemuloj povis sekvi lingvajn kursojn, ricevi valorajn konsilojn dum la prelegoj pri lingvolernado, kaj praktiki siajn kapablojn. Estis speciala atento por novuloj. Ankaŭ estis danckursoj, ĵonglado, jogo, masaĝoj ktp. Ekskursantoj malkovris la lokajn vidindaĵojn de Cottbus kaj ekhavis interesajn informojn pri la slava popolo soraba.
La vespera programo estis tre riĉa kun prezentoj de multaj amuzartistoj, oni povis partopreni kaj eĉ ekzerci …….. karesadon ! La Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO) renkontiĝis kun siaj membroj, aktivuloj, subtenantoj kaj interesitoj.
Pretere dirite, pluraj homoj estis trafitaj de malsano, kiu ŝajne propagiĝis pro malvarmo kaj, laŭ la raporto de Manuela Ronco en 'Esperanto', pro la multaj kisoj dum la novjara balo. Li certas ke ĉiuj ĉeestintoj longe ŝatos rememori tiun ĉi intensan semajnon!
Fotojn vi povas vidi ĉi-tie.

La sekvanta Junulara E-Semajno okazos de 27 dec. 2011 ĝis 1 jan. 2012 en Gdansk, Pollando.  Vidu ' Zielona Brama' (Verda Pordego) en strato Długi Targ kaj aliajn fotojn kiaj ĉi-flankan.

----------------------------------------------------------//--------------------------------------------------------------------------

**Internacia Festivalo (HDP) en Nördlingen, Germanujo**

Personuloj el foraj landoj kiaj Israelo kaj Japanujo kaj amaseto da aliaj konataj esperantistoj venis al neĝa kaj frosta urbeto Nördlingen, ĉe la rando de Bavarujo, en la fino de la jaro 2010a. La tiea fama Internacia Festivalo (IF), daŭre reĝisorata de Hans-Dieter Platz (HDP) okazas jam la 27-an fojon. Laŭ sia retejo (tie vi ankaŭ povas trovi fotojn, klakinte sur 'Albumo' maldekstre) IF ofertas specifan programon por plenkreskuloj kaj familioj (kun aŭ sen infanoj), okazas sub profesinivela gvido kaj kunvenigas ĉiujare 120 ĝis 160 personojn el proksimume 20 landoj. IF estas aranĝo por lingve spertaj personoj, kono de

[1] Membroj kun Jarlibro (MJ aŭ MT) kaj Membroj-Abonanto ricevas la revuon papere aŭ perinterrete. Simpla abono (SA) al la revuo ankaŭ eblas. La kostoj de tiuj kotizoformoj estas respektive 25, 61 kaj 38 eŭroj en A-landoj (landoj de Eŭropo kaj iliaj tiurilate egalspecigitaj)
[2] paralele al Novjara Internacia Semajno (NIS, por junuloj kaj junaj plenkreskuloj)

Esperanto kaj ĝia uzo estas gravaj, sed laŭdezire ĝi ofertas porkomencantajn kaj/aŭ paroligajn kursojn, ekzemple por via partnero.

El la raporto de Claude Nourmont en la revuo 'Esperanto' JD resumas:

Pluŝa ursego, Steiff [Ŝtajf], ĉe la enirejo de la moderna kaj komforta gastejo bonvenigis centon da partoprenantoj, kiuj poste ĝuis interkonan vesperon, sekvatan de babilado kaj trinkado en la fama IF-Knajpo[3]. Tuj en la etoson! Oni retrovas malnovajn konatojn, kaj ekbabilas kun novalvenintoj. IF elstaris ĉi-foje per la riĉeco kaj alta nivelo de la prelegoj. Okazis multaj brilaj paroladoj, interalie dek prezenoj po 90 minutoj kadre de la 4-a Internacia Vintra Universitato, agnoskita kiel AIS-studsesio kun ekzameniĝo.
La kursoj estis gajaj, kaj la ĉeestantoj feliĉaj. Temoj estis ekzemple meteoritoj (kaj poste eblis vizito de muzeo pri regiona kratero de antaŭ 15 milionoj da jaroj), la vivo de Aleksandro Dumas kaj Antoine Galland (kiu venigis Eŭropen la "Mil kaj Unu Noktoj") prezentitaj de Daniel Moirand. Tre gaja estis kurso pri la hebrea lingvo gvidata de Josef Shemer.
La oficiala temo estis 'lingvoj'. En tiu kadro estis ankaŭ paroladoj pri la nederlanda kaj dana, oni eksciis kelkajn bazaĵojn pri la armena, la jida, la latva, la luksemburga, la rusa, pri kelkaj dagestanaj lingvoj, kaj ankaŭ pri la franca gesta lingvo.
Aliaj temoj estis astronomio, vojaĝoj tra operoj, reta Esperanta proverbaro. Kelkaj programeroj celis plibonigon de nia sano: prezentoj pri la korea ginsengo, pri kuracado laŭ pastro Kneipp kaj la saŭno, kiun ĝuis multaj partoprenantoj.
Por la tria fojo okazis KER-ekzameno. Mikaelo Bronŝtejn, kiu reĝisoris grandan parton de la vesperaj programoj, ankaŭ prezentis sian novan libron Urbo Goblinsk, kaj Dmitrij Ŝevĉenko kun Anna Striganova prezentis du siajn bildfabelojn Ŝipeto Narklo kaj Gargoĉjo.
La tradiciaj eroj fariĝis: jarŝanĝiĝa ("Silvestra") bufedo: foti, sidi, saluti, manĝi… balo, huraoj kaj kisoj laŭ la horzonoj ekde Japanujo ĝis Britujo. La magiisto kun la blua ŝtono, Triksini, imponis. Oni vizitis la imponan mezepokan ĉirkaŭmuregon de Nördlingen, pordeg-turojn kaj aliajn vidindaĵojn kaj muzeojn. La tuttaga ekskurso kondukis al München (Minken), kie eblis gustumi nur iom de la etoso en la fama *Hofbrauhaus* (Kortega bierfarejo). La aranĝon salutis el Moskvo la ambasadoro de Germanujo en Rusujo Ulrich Brandenburg, kiu ĉi-foje pro laboraj devoj ne povis partopreni en IF; li promesis ke li klopodos veni al la 28-a IF en Xanten [Ksanten]. Tiu okazos de 27 dec. 2011 ĝis 3 jan. 2012.
Vidu muelilon kaj katedralon de Xanten kaj aliajn fotojn kiaj ĉi-flankan.



**Rekonstruoj el la romia epoko de la urbo**

---------------------------------------------------------//---------------------------------------------------------------------------

**Novjara Renkontiĝo (EsperantoLand) en Saarbrücken, Germanujo**
Ĉi-jare entute 73 infanoj kaj 121 plenkreskuloj kaj pli aĝaj junuloj (15-jaraj kaj pli) venis por tuta semajno al la bela surrejna urbo Saarbrücken [Sarbriken] por la 9-a Novjara Renkontiĝo (NR), organizita de la asocio EsperantoLand kun la temo "estonteco". Aparta porinfana ĉeftemo estis "la maro".

El la raportoj de Lu Wunsch-Rolshoven en revuo "Esperanto" kaj en "La Ondo de Esperanto" JD ĉerpas:

La infanoj el plej diversaj landoj venis kun siaj gepatroj kaj aldoniĝis pliaj paroj kaj unuopuloj – ĉefe el la meza generacio.

Christoph [Kristof] Frank, Betti Maul-Propadović [Maŭl Propadoviĉ], Nicky [Niki] Janssen kaj deko da helpantoj prizorgis allogan infanan kaj junularan programon. Eblis ekzemple partopreni en granda pirata festo, ekzerci pupteatradon, manlabori kaj ludi diversmaniere.

---

[3] Etosplena gastejo, laŭ la germanlingva 'Kneipe'

Duono de la infanoj ankaŭ ĉi-foje havas Esperanton kiel denaskan lingvon, kio multe helpis zorgi pri Esperantlingva etoso ankaŭ inter ili. Triono de la plenkreskaj partoprenantoj venis el Germanujo, kvarono el Francujo, la aliaj el deko da eŭropaj landoj kaj el Kanado kaj Urugvajo.
La pli aĝaj junuloj kaj junaj plenkreskuloj bone amuziĝis, organizante sian propran programon kadre de tiel nomata "Novjara Internacia Semajno" (NIS), kelkfoje aparte, ekzemple per ludoj, babilado, ekskurso aŭ en la diskoteko, kelkfoje elektante erojn el la cetera propono.



La 'direktoro' de EsperantoLand kun Leen Peeters (foto Peter Hauser)

Novaĵo en la vespera programo estis kabareto de Christoph Frank. Riĉa estis la muzika kaj danca programo: Kunvenis du ĥoroj, estis popolmuzika ludejo, diversaj dancgrupoj de cirkla ĝis orienta danco. Prezentiĝis du koncertoj, de Kim Henriksen kaj de Xavier [Ksavje] Rodon Morera, konataj kaj delonge ŝatataj spertuloj de la Esperanto-muziko.
La ĉeftemo de la prelega programo estis "estonteco". En kvardeko da prezentoj eblis ĝui prezentojn pri interalie energiŝparaj domoj, rekta demokratio, prognozomodelo aŭ la estontecoj de literaturo kaj lingvo.
Oni povis krome lerni pri la hinda Ramajana-rakonto, tradukado, lingvo-politiko, prezentoteknikoj, manĝokutimoj, infanaj fakaj bildlibroj, la programlingvo Scala ktp.



Bitburg (de kie venas tiu fama biero)

Ĉiam NR subtenas la perfektigon de la lingvaj kapabloj: Okazis kvar kursoj de Marianne Lund, Jean Luc Kristos, Sylvain Lelarge kaj Gunter Neue. Kaj eblis ekzameniĝi diversŝtupe laŭ la Eŭropa Referenckadro ĉe Katalin Kováts kaj helpantoj.
Plaĉa estis ankaŭ la jarfina festo, kies diskoteko longe daŭris kaj permesis al kelkaj junuloj almenaŭ unufoje dum la semajno ĝui la matenmanĝon de la domo...
Plenŝtopita programo, ĉu? Jes estis, sed restis ankaŭ multa tempo por babiladi en nia kafejo kaj dum promenoj.
Tamen organizanto Wunsch Rolshoven [Vunŝ Rolshofen] ne suferis pro la paralela mastrumado de NR (plenkreskuloj, ofte kun infanoj) kaj NIS (novplenkreskuloj) en Saarbrücken, ĉar venontan jaron je 27 dec. 2011 ĝis 3 jan. 2012 li okazigos renove renkontiĝojn por ambaŭ celgrupoj kune, tiam en Bitburg, Germanujo.

-----------------------------------------------------------//-----------------------------------------------------------------------------

## Jarfina Renkontiĝo de Grezijono, Francujo

Mi neniam estis en Grezijono (Grésillon). Ja la ekspluatado de la kastelo prezentis problemojn de bontenado de la konstruaĵo. Eble ankaŭ la mastrumantoj ne trovis la ĝustajn regulajn luantojn, ĉar inter tuta listo de esperantistaj grupoj alterne tie subtegmentis: FESTO, FRInGoJ, KEFO, REF kaj 'Somera Universitato' de EDE.
Kiel ajn, en 2008 kaj 2009 estis anoncitaj jarfinaj renkontiĝoj tie, sed ambaŭfoje oni devis lastmomente nuligi ilin.
Ĉar nun aperis raporteto de jarfina renkontiĝo 2010-2011 de François [fransŭa] Lo Jacomo:

> *Kvankam nur duono de la kastelo estis hejtata - hejtado de la tuto estas grava plano por la venontaj monatoj - tio sufiĉis por dudeko da homoj, 8- ĝis 88-jaraj, kiuj maskitaj ĝuis la silvestran festenon. Aldoniĝis programeroj – jogo, simbola lingvo Bliss, EDE, memoraĵoj pri Grezijono, lingvaj respondoj, kantoj, ekskurso... -, kiuj plenigis la tritagan restadon.*



Eble vi jam vidis la ĉarme timigan bildon en la revuo 'Esperanto', dekstre:
Koncerne tiun bildon Bert Schumann sendis al mi jenan priskribon:

**Fantomo kun flamverda stelo**



En malnovaj kasteloj kutime loĝas tiuj moviĝantaj estaĵoj kovritaj per blanka tuko.
Vi konas tiujn el anglaj filmoj, kiuj timigas la loĝantojn de siaj prisorĉitaj domoj. Vi eble ne konas tiun etan fantomon, kiu malŝatas resti sola dum la malvarmaj monatoj kaj tial invitis amikojn festi kune ĉirkaŭ la lasta jarfino. Tiuj amikoj venis bele maskitaj dum la silvestra nokto. La fantomo fotiĝis kun siaj dudek amikoj, sed tamen ne videblas. Se vi deziras vidi ĝin flamverdan, vi devus ĉeesti la silvestran noktomezon en kastelo Grezijono.
Jen en koloroj: http://www.gresillon.org/IMG/jpg/BondezirFoto10.jpg !

Kaj maldekstre la kastelo:
Ĉar nun oni eĉ planas 'Jarfinan Renkonton kun Novjara festeno' en 2011 (vidu la programon por 2011, ankaŭ por la somero), mi serĉis ĝin sur la mapo: La kastelo situas en la franca departamento Maine-et-Loire (laŭ riveroj Mene kaj Lŭaro), 2,3 km for de Baugé [Boŭĵej].

----------------------------------------------------------------//----------------------------------------------------------------------------

### SANO (Interkultura Centro Herzberg) en Sieber, Germanujo

La riĉa jarpleniga programo de Interkultura Centro Herzberg (aŭ: Germana Esperanto-Centro) enhavis ankaŭ aranĝon dum la jarŝanĝiĝo. Ĝi estis prezentita kiel alternativa novjarfesto sub la nomo nomiĝis SANO (Saneco, Alternativo, NOvjaro) kaj allogis ĉirkaŭ dek partoprenantojn, inter kiuj jenaj du ĉarmaj junulinoj. Plenan programon vi povas vidi ĉi-tie.



La programo enhavis interesajn fakprelegojn ekz. pri sana nutrado kaj alternativaj energisolvebloj, vivmanieroj, prezentadojn pri vojaĝoj, estis leciono pri jogo, okazis ekskursoj al la belega Harz-regiono, al historiaj urbetoj, al monaĥejo Walkenried, al nova viskifabriko, eblis skii, migradi, sportumi. Aldoniĝis ludado de muziko kaj komuna kantado. Regis vigla, festeca etoso en kaj ekster la komforta feridomo. Bonvenon al ĉiuj kunfestontoj en decembro 2011!

# Nur renkontiĝoj en Francujo kaj Germanujo ?

### Armenujo

Estas atentokapte, ke ŝajne nur en Eŭropo floras tiuj regulaj laŭsezonaj renkontiĝoj.
Via redaktanto tre ŝatus sciigi pri similaj ekster Eŭropo.
Pene mi sukcesis trovi unu armena (okcidenta Azio) kaj kelkajn en orient-eŭropa Ukrainujo.
La armena programo enhavis rabatitan kotizon por enloĝantoj de KSŜ. Ĉu vi scias kio estas KSŜ ?
Montriĝis tio signifas "Komunumo de Sendependaj Ŝtatoj", la pala posttempaĵo de Sovet-Unio, kreita en 1991. Ĝin membras Belorusujo, Ukrainujo, Turkmenujo, Rusujo, Azerbajĝano, Armenujo, Kazaĥstano, Kirgizujo, Moldavujo, Taĝikujo, Turkmenujo kaj Uzbekujo. Evidente ĝin ne membras la baltaj landoj kaj Kartvelujo, kiuj estas kontraŭ la granda Rusujo. Azerbajĝano kaj Armenujo, malgraŭ sia konflikto el 1991, sidas kune en KSŜ.



Armenaj esperantistoj ripozas en Caĥkadzor

Tion mi eltrovis post informo de prezidanto de Armena Esperantista Unuiĝo, pri ĝia *1-a Internacia Esperanto Semajno* en la ĉefurbo Jerevan (29 jun. – 2 jul.) kaj la 54 km fora Caĥkadzor (2 jul. – 5 jul.).
Prezo, se vi loĝas en KKŜ-lando: 40 eŭroj, se en alia eks-socialisma lando aŭ en Afriko aŭ en Azio – escepte de Israelo, Koreujo kaj Japanujo: 60 eŭroj. Por enloĝantoj el aliaj landoj: 70 eŭroj. Ok eŭropanoj jam aliĝis (1 maj. 2011), apud dek ses armenoj.
Por multaj landoj vizo estas havebla sur flughaveno “Զվարթնոց” (Zvartnoc) kontraŭ 7 eŭroj. Konsultu la riĉan retejon.

### Multaj renkontiĝoj en Ukrainujo

Por la dua jaro esperantistoj kaj novuloj je la lingvo kunfestis la lokan karnavalon en Odeso. La festado de la 1-a de aprilo estas specifa tradicio de Odeso, unusola karnavalo de Ukrainujo, malsimila al aliaj karnavaloj en la mondo. Partoprenantoj venis el Ukrainujo, Belgujo kaj Pollando, entute 60. Ili povis aŭdi kaj paroli, kaj senti la etoson de la Movado kaj la “senlima lando” Esperantujo.





Simpla programo estis: Karnavala tago, Ekskursa Tago, Koncerta Tago.
La kunveno nomiĝas *Esperanta Humurino* kaj estos aranĝita ankaŭ en 2012, 30 mar. - 1 apr aŭ 31 mar. - 2 apr..

Ukrainujo konas multajn eventojn por esperantistoj, ĉi-jare ĉefe estos junularaj aranĝoj, pro IJK:
Aroma Jalto en Jalto (2010: 29 apr. - 9 maj., 2011: 29.04 - 09.05),
MIaMU (2010: 10-24 jul., 2011: 26 maj. – 10 jun.)
Renkontiĝo de Amikoj en Tarhankut, Krimeo (2010: 1-10 jul., 2011: 3-13 jul.), organizita de klubo de Novosibirsk, Rusujo, informpetu ĉe katka8(heliko)ngs.ru
IJKo en Kijivo (nur ĉi-jare: 14-21 jul.)
Velura Sezono en Jalto (2010: 18 - 27 sep., 2011: 22-30 jul.)
Milan Zvara-Esperanto-turista marŝo en subkarpata provinco (2011: 7 - 14. aŭg.)
Kijiva Esperanto-Semajno en Kijivo (2010: 24-30 okt., 2011: 24 - 30 okt.)

kaj, se vi havas guston pluvojaĝi nord-orienten de Ukrainujo, iru al ………………… la 16 Internacia Lingva Festivalo en Ĉeboksaro (Чебоксары, ĉuvaŝlingve: Шупашкар), Rusujo je 15-23 okt., organizita de Junulara Esperanto-Asocio de Ĉuvaŝa Respubliko.




### Hispanujo
Luis Serrano Pérez petis min anonci la okazon de "19-a Internacia Esperanto-Semajno de Kulturo kaj Turismo" en Malgrat de Mar (Barcelona), Hispanujo, de 1 okt. ĝis 8 okt. Skribu al li por informoj.

### Brazilo
Carlos Maria anoncas la okazon de "6-a BRES (Brazila Renkontiĝo de Esperantistoj-Spiritistoj)" en Federacia Distrikto Taguatinga, Braziljo, Brazilo, de 22-a ĝis 25-a de januaro 2012. Minimume 50 homoj partoprenis la 5-an bres-on. La ĉefa temo estis: “Spiritistoj, amu kaj instruu vin!”

# Aŭtora registro de 2002 ĝis 2007

**Signifo de la nombroj:**
**39**: n-ro 39 (1/2002), **40**: n-ro 40 (2/2002), **41**: n-ro 41 (1/2003), **42**: n-ro 42 (2/2003), **43**: n-ro 43 (3/2003), **46**: N-ro 46 – februaro 2007, **47**: N-ro 47 – somero 2007, **48**: N-ro 48 – aŭtuno-vintro 2007

**Kontribuetoj sen mencio de aŭtoro**: Bonan apetiton! (7, 8), Novnaskitoj en E-familioj (8, 10, 46, 47), Du etuloj (10), Esperantistino-pentristino Helga Plötner (10), Esperanto havis najtingalon (10), Humuro (7, 8, 9, 10), IIk 2003 (9), Infanlibro (8), Infanoj, E-domo, Kostrena (7), Iru ni al … (6, 7, 8, 9, 10), Kalendaro kaj mallongaĵoj (46, 47), kantoj "Ni iris sur vojeto", "La semajno" (48), Kantoj vi ... (10), Kiel naskiĝis "Paca nokt' ..." (10), Korespondi deziras (7, 8, 9, 10), Kun sia trijara filino (6), Kvargeneracia E-familio (10), Librobreto (6, 7, 8, 9, 10), mallongaj anoncoj (48), Ni funebras (7, 9), Novaj paroj (8, 9, 10), Pasporta Servo de Rondo Familia (6), Porinfanaj versaĵoj (46), Rete haveblaj "Kantantaj Birdoj" (10)

**Kontribuoj de aŭtoro (laŭ alfabeta vicordo)**: **Abir Dasgupta**: Kion legi? (9), **Amri Wandel**: La tri generacioj de la esperanto-socio, Retrorigardo pri novjaraj aranĝoj (IS, IF, AS, NR), La novaj vizaĝoj de Rondo Familia (6, 46), **Andersen, F. Skeel-Giorling**: La princino sur pizo (46), **Aurelia Sokół**: Esperanta familio en Familia Esperanto (10), **Bart Demeyere**: Mi, mia filo kaj la ĉi-jara Renkontiĝo de Esperantistaj Familioj (7), **Bart Demeyere kaj Svisa Esperanto-Societo**: Oni pri ni (10), **Bert Schumann**: Okazonta 38a Infana Internacia Kongreseto, IIK en Jacugatake (46, 47, 48), **Carmen B. de Gasztold**: La preĝo de la grilo (7), **Claude Rouget**: Festo familieca: 17-a de majo en Norvegio, "Infanoj plej bonfartas en Nederlando", Kiu E-aranĝo por Novjaro? (Düsseldorf, Föckinghausen, Malbork), Aliaj novaj DVD-filmoj, E-familioj en Pasporta Servo (46, 48), **Claude Rouget, Katarina Bodnárová**: Vortoj de la redaktanto (aŭ simila titolo) (8, 46, 47, 48), **Cyrille Hurstel**: Libro kaj sonbendo "Ĉio fareblas" (47), **Cyrille Hurstel kaj Nian Peng**: “Au pair” parolas Esperanton kun infanoj (48), **Dagmar Neubronner kaj Eva Formaggio**: Kial gravas bonaj familiaj rilatoj ? (47), **Edmund Grimley Evans**: Infanoj distingas lingvojn vide (47), **Elisabeth Barbay**: Reage, aldone al infan-movado 'Tapori' (10), **Elisabeth Kuhl**: Ne nur por infanoj (6, 7, 8), **Esperantina Mirska**: Desegnata poemo (6), **Eva Buchwald-Christensen**: Kial nemovadano uzas Esperanton (8), **Fabienne Berthelot kaj Istvan Ertl**: Kvarlingva familio Berthelot-Ertl (47), **Familio Diaz**: Denaskeco en Kubo (46), **George Herbert**: Amo (9), **Jacob Nordfalk**: Porinfanaj filmoj en Esperanto (48), **James Rezende Piton**: Lingva jarfino en Brazilo, Nova membro de RF-komisiono prezentas **sin (7, 8)**, **Jennifer Bishop**: Jenny, la triageneracia esperantistino (46), **Jon Rommesmo**: La porko kaj ĝiaj vivkondiĉoj, poemo "La tomato kaj la cepo" (48), **Joost Witteveen**: pri http://galerio.org (6), **Jouko Lindstedt**: 23-a Printempa Semajno Internacia (47), **József Baksa kaj Esperanto-Societo de Rijeka**: Du domoj je via dispono (9), **Judita Rey-Hudeĉek, familio.komputilo.org, esperanto-maribor.si, esperantoland.org, bertosch.free.fr**: Invitoj al estontaj aranĝoj (Mezeŭropo estas mia hejmo, 29-a REF, IK de la 7-a EEU-Kongreso, 5-a Somera Mezeŭropa Renkontiĝo, 38-a IIK en Japanio (6, 8, 47), **Julianna Vas-Szegedi:** 29-a REF en Hungario (48), **Kálman Kalocsay:** "Septembro, oktobro" (7), **Katalin Kováts:** Kiu havas la zebron ? (47), **Katarina Bodnárová:** Pensoj de Uzbeka filozofo Hamid Zumin (6), **Katarina Bodnárová, Familio Kleemann, Simone Fischer-Sorg, Thomas Kleemann**: Ni rememoras pri Lucerno, 1979 (17-a IIK) (6, 7), **Katja Steele:** Familiece en Aŭstralio (46), **Katja Steele, Hiongun Kim:** Esperanto-familio Kim el Koreio (48), **Klara Ertl, Alina Brðcker, Hajnal MacGill, Vera Krivenko**: Desegnis por ni (6, 7, 8, 9), **Kokou Sagbadjelou:** Familiaj travivaĵoj en 2001 (7), **Koroljov (P. Fiŝo):** Kiel paroli Esperanton kun sia trijara filino ? (6), **Kroata Esperantista Unuiĝo:** Internacia tago de la infanrajtoj (9), **Larissa kaj Laura:** Itala-finna junamikeco per Esperanto (47), **Lars Sözüer:** Galerio de E-Familioj (7, 8), **Leen Deij kaj Lilli Giloteaux:** Eldonisto serĉata (10), **Liba Gabalda:** Raporto pri 23a Internacia Festivalo, La 19-a IF, Pri la 18-a Internacia Festivalo en Magdeburg, Germanio (6, 9, 46), **Lu Wunsch Rolshoven**: Raporto pri 5a Novjara Renkontiĝo, Paskaj familiaj renkontiĝoj okazontaj en Bonn, Greziljono kaj Adriatika maro (46), **Luis Ladeira**: La revo de la porketo To (47), **Magdaléna Ŝaturová**: Memore (10), **Magdziak Agnieszka kaj Krzysztof**: Tapori, infan-movado tutmonda (9), **Maire Mckay**: Ginko (9), **Mairead Corrigan Maguire**: Kiel senperforte venki maljustecon (8), **Margret Brandenburg**: Historio de Gepatra Bulteno, La familio Brandenburg el Germanio (9, 10), **Matthias Behlert, Vladimír Němec**: Lingva angulo (6, 7, 8, 9), **Matthias, Sagbadjelou kaj Choe, familioj**: El la familiaj albumoj (10), **Morteza Mirbaqian**: Iranaj proverboj (10), **Norberto Diaz Guevara kaj Claude Rouget**: Legindaj libroj kaj spektindaj filmoj (46), **Normand Fleury**: Skribu al Avo Frosto en Esperanto (48), **Osmo Buller**: Fabelo internacia, Invito al Esperanta fabelkonkurso (8, 9, 10), **Paŭlo Balkânyi**: Poemeto por desegni homon (8), **Perrault, Donald J. Harlow**: Ruĝkapuĉetulino (46), **Peter Tau**: Eterna komencanto de la monda lingvo (9), **Probal Dasgupta**: Pri 12-jara Abir Dasgupta (9), **Rachel Prual kaj David Cholet**: Vojaĝo ĉirkaŭ la mondo (9), **Roberto kaj Kristoĉjo Resende**: Juna kaj talenta (8), **Sano Joŭko**: E-familioj en Japanio kaj aziaj landoj (48), **Stanislaw Mandrak**: Ĉu Esperanta familio? (8), **Tali Wandel**: Steiner-lernejo por handikapitoj (47), **Tatjana Loskutova**: Familie en Rusio (9), **Teresia de Avilo**: Okaze de ĉiuj novaj jaroj (10), **Trevor Steele**: Kaj mi mortpafis lin, Ĉu tiel naskiĝas vortoj ?, Kriza momento (6, 8, 9), **Vanja Radovanović**:
Kiel denaske?, 5-a Familia Montkabana Renkontiĝo (46, 47), **Vilma Eichholz**: Lot-versaĵo (10).